

Wilhelm Raabe,

Supertere

tradukita de Manfred Retzlaff

Nun ŝvebas supertere
La lunoarka bril'.
Deiĝu de l' sufero
La kor', de l' maltrankvil'.

Dum la etern' silentas,
Laŭtegas hom-afer'.
Sed Dio malatentas
Kverelon sur la Ter'.

Enpaŝu vi trankvile
Ennokten, klinu vin!
Doloron vi humile
Eltenu. Venos fin'.

Nun sinkas en malhelon
Vantaj' malantaŭ vi.²
Brakumas la ĉielon
L' animo en ebri'.

*Traduko de la Germana poemo "Das Ewige ist stille" de WILHELM RAABE (*1831-09-06 – †1910-11-15)
en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04).*

Arg-642-1295 (2012-11-03 15:23:25)

²aŭ:

Vantaĵo for de vi.